



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

N-ro 13/1976 - 25 marto 1976

Aperas ĉiusemajne

Baldaŭ aperos

"Mein geliebtes Esperanto"

poŝlibro en
germana lingvo.

Legu detalojn
sur paĝo 3!

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg

Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

Salutvorto por Eŭropa Esperanto Kongreso

Düsseldorf (pp) - La ĉefministro de Nordrhein-Westfalen, Heinz Kühn, dediĉis al la Eŭropa Esperanto-Kongreso jenan salutvorton:

"Al la partoprenantoj de la Eŭropa Esperanto Kongreso 1976 en Eindhoven mi transdonas la salutojn de la landa registaro de Nordrhein-Westfalen. Ĉi tiun internacian kongreson, al kies honora komitato mi aliĝis, mi salutas kiel videblan signon de forta sento de esperantista solidareco. Ĝi ja kontribuas, kiel ankaŭ la ceteraj larĝampleksaj aktivecoj de la Esperanto-adeptoj, al la plibonigo de la rilatoj inter la popoloj.

La konvencia vojo de nia fremdlingva instruado ne jam povis konduki al ampleksa lingva interkompreniĝebleco malgraŭ pliintensigitaj streĉoj dum la pasintaj jaroj. Tro grandaj estas la diferencoj de la respektivaj lingvo- kaj kultursferoj de la popoloj. Ĝuste jen kuŝas la granda ŝanco kaj la ebleco de Esperanto, de ĉi tiu internacia lingvo por servi kiel dua lingvo de interkompreniĝo de la popoloj sub samtempa konservo de la nacia lingva varieco.

Mi deziras al la Esperanto-amikoj, ke iliaj ideoj furoru inter la junularo. Kontribuu al tio la kongreso en nia najbara lando.

Heinz Kühn

Ĉefministro de la

Lando Nordrhein-Westfalen "

EK-kunveno en Hamburg

Hamburg (pp) - Marde, la 30-an de marto 1976, okazos kunveno de Eŭropa Klubo en Hamburg, Restoracio Fürstshof, Juliusstr. 50, je 20,30 horo. La postan tagon komenciĝos la Simpozio de la Asocio pri Programita Instruado.

Eŭropa Klubo nun havas 100 membrojn laŭ la membroletero n-ro 5.

Pilo-Press: Jara abono 30,-- GM

Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1

Postscheckkonto Nürnberg 819 56-851

Esperanto-propono akceptita

Vieno (pp) - Antaŭ nelonge okazis en Vieno la 23-a Socialista Partitago Aŭstria. En ĝi oni decidis pri pli ol 600 proponoj. Inter ili estis ankaŭ propono de Aŭstria Socialista Ligo Esperantista sub la numero 560.

Tiu propono 560 tekstas:

"La 23-a Liga-Partitago subtenas la klopodojn por la enkonduko de Esperanto kiel egalrajtigita laborlingvo ĉe la Socialista Internacio. Al la planita Socialista Kongreso esperantista en Romo estu sendota oficiala reprezentanto de la Socialista Partio."

La supra propono estis akceptita per ĉiuj voĉoj, sed pro la dua frazo asignita al la nova estraro de la partio. La decido pri ĝi okazos, ĝis la kongreso en Romo laŭ la dato estos fiksata. (Fritz Mosek)

Honora Komitato de SUK

Liège (pp/pf) - Ala Honora Komitato de la ĉi-jara Sesio de la Someraj Universitataj Kursoj aliĝis:

- R. Van Elslande, ministro pri eksterlandaj aferoj
- P. Harmel, prezidanto de la Senato
- A. Dequae, prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj
- A. Humblet, ministro pri nacia edukado franclingva
- A.J. Pieters, prezidanto de la Sinodo de la protestanta eklezio

Stipendio por virino

Jam en la pasinteco multe helpis la partoprenon en Someraj Universitataj Kursoj (SUK) stipendioj, kreitaj de organizaĵoj aŭ individuoj. Ankaŭ por la ĉi-jara sesio de SUK, kiu okazos inter la 8-a kaj 29-a de aŭgusto 1976 en Antwerpen, Belgio, antaŭvideblas stipendioj por studentoj, kiuj havas financajn malfacilaĵojn.

La Esperanto-Klubo "La Erikejo" de Kalmthout kreis stipendion de 4.180 belgaj frankoj, nur atribueblan al virino, pri kiu decidos ĵurio starigota de "La Erikejo". Studentinoj, kiujn interesas la temoj de la ĉi-jara SUK - matematiko, biologio aŭ sociologio - povas kandidatiĝi por la stipendio ĉe SUK-estraro: Boite Postale 9, B-4000 Liège 3, Belgio.

Malmö - 70-jara

Malmö (pp) - Sveda Esperanto-Federacio ĉijare festas sian 70-jaran jubileon.

Sed ankaŭ la klubo en Malmö povas festi la saman jubileon. De eta kurso-grupo Malmö evoluis kaj kreskis kaj sukcesis vivi dum du mond-militoj. La klubo energie informis pri Esperanto en multaj diversaj manieroj kaj senĉese starigis kursojn. Por siaj membroj la klubo faris sian plejblon por montri, ke oni povas uzi Esperanton praktike sed samtempe la membroj mem kaptis la okazon ĉeesti aranĝojn en- kaj eksterlande.

El la kluba historio: En 1948 la klubo ricevis la taskon aranĝi la 33-an Universalan Kongreson de Esperanto. Jam dum 46 jaroj aperas la kluba informilo "La Folio". La klubo havas propran, luitan klubejon kaj riĉan bibliotekon.

Malmö - 70-jara (daŭrigo)

La jubilea festo okazos la 3-an de aprilo 1976.

Pilo-Press gratulas al la klubo kaj deziras ankaŭ estonte frukto-donan laboron.

Sendu gratulkartojn aŭ -leterojn al S-ro Jan Strömne, prezidanto de la klubo, Amiralsgatan 36, S-211 55 Malmö.

Mein geliebtes Esperanto (Mia amata Esperanto)

Kiel ni jam informis en antaŭa numero, baldaŭ aperos poŝlibro en germana lingvo pri Esperanto de Richard Schulz sub la titolo

"Mein geliebtes Esperanto" en la eldonejo Bleicher Verlags-KG, Gerlingen.

Ĝis la 30-a de aprilo 1976 validas subskripcia prezo rabatita: 11,80 DM.

Mendojn je tiu rabatita prezo akceptas Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg.

Post la 30.4.76 la poŝlibro kostos 14,80 DM.

Sendu vian antaŭmendon tuj!

Okaze de la inaŭguro de la nova eldoneja konstruaĵo la eldonejo Bleicher Verlags-KG, kiu eldonos la poŝlibron, invitis pli ol 100 honorajn gastojn (politikistoj, eldonistoj, librovendistoj, aŭtoroj, artistoj kaj ĵurnalistoj) al vespera aranĝo, dum kiu ankaŭ Richard Schulz, la aŭtoro de la poŝlibro "Mein geliebtes Esperanto", prelegis pri la internacia lingvo Esperanto.

7-a Kultura Semajnfino

De la 7-a ĝis la 9-a de majo 1976 okazos la 7-a Kultura Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo en la konferencejo "Junkerwald" de la "Arbeitskammer des Saarlandes" en Blieskastel-Niederwürzbach.

La programo antaŭvidas jenajn kursojn:

A. Por komencantoj: Enkonduko en la Internacian Lingvon Esperanto. Lernolibro: W. Auld: Esperanto einmal anders. Kursestroj: Karl Burger kaj Walter Ehrmantraut.

B. Por progresintoj kun antaŭkonoj: parolaj kaj tradukaj ekzercoj por profundigi lingvajn konojn. Ekzerclibro: C. Rossetti: Kredo nin, sinjorino. Kursestro: Jean Thierry, Paris.

C. Por Esperanto-parolantoj okazos prelego-serio pri la temo "La Esperanta traduk-arto".
Preleganto: Fernando de Diego, Zaragoza. Kondiĉo por partopreno estas la kono de almenaŭ unu el la tradukoj de la preleganto.

Krome okazos ampleksa libertempa programo: konversacia vespero, katolika diservo en Esperanto (pastro Roger Degrelle, Nancy,) vin-gustumado kaj arbara migrado.

Ankaŭ infanoj povas partopreni; pri vartado estos zorgata.

Aliĝkotizo 10,- GM. Informojn donas: Sarlanda Esperanto-Ligo, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler.

Respondo en 350 000 ekzempleroj

Responde al leganto, la ĵurnalo "La Voix du Nord" aperigis la 27-an de februaro detalan artikolon pri la nuna stato de Esperanto; eldonkvanto de la gazeto estas 350 000 ekzempleroj.

Esperanto en la Radio

Varsovio. Ĉu finnaj esperantistoj flugos per "L.L. Zamenhof" al Ateno? En la Esperanto-Ekspreso oni eksciis, ke finnaj esperantistoj flugos karavane de Helsinki al Ateno per aviadilo de la pola fluglinio "LOT". En Varsovio la karavano interrompos la flugon por unutaga restado. Interesuloj, kiuj je tiu tempo vojaĝos al Varsovio kaj intencos partopreni la UK en Ateno, povas aliĝi al la karavano. Dum la Esperanto-Ekspreso estis aŭdebla ankaŭ intervjuo kun Tacuo Hugiĉimoto el Japanio pri la "ludovikitaj" eldonaĵoj, el kiuj intertempe aperis volumo 4 sub la titolo "tamen la afero progresas".

Anstataŭ la "panoramo de internaciaj eventoj" dimanĉe posttagmeze estis aŭdebla aktuala sonraportaĵo pri la balotoj al la Sejmo.

El la semajna rubriko "El la vivo de Pola Esperanto-Asocio" ni aŭdis iun vivosignon de Pola Esperantisto. La lasta aperinta numero estis tiu kun la numero 1-2/1975. Do tiu revuo havas prokraston de pli ol unu jaro. Nun oni eknomis novajn ĉefredaktorojn kaj esperas iam ĝisdatigi la revuon. Esperable la intenco sukcesos!

Radio Zagrebo. Pri "mirinda fervojo" temis la radia artikolo post la kutimaj "Novaĵoj el Jugoslavio".

Svisa Kurtonda Servo. Daŭras la altnivelaj prilingsaj prelegoj de d-ro Arthur Baur pri la romanĉa lingvo (ĉi-foje pri la influo de la germana lingvo) kaj de ges-roj Gacond pri Esperanto-instruado.

Vieno. Nun, feliĉe, post la plilongiĝo de la tago, tiu stacio estas aŭdebla ankaŭ sabate vespere. Post la semajna komentario de d-ro Alfred Macher Ingrid Plazotta kaj Emil Vokal prezentis raporton de d-ro Karl Beckmann pri ekspozicio en la Viena Historia Muzeo sub la titolo "Mezepoka Vieno".

El la semajna komentario ni citas: "Multe pli multe ol la revigligantan kritikon de la opozicia Popolpartio nia publiko atentis la tragihe pliakrigantan krizon en Italio. Des pli, ĉar ni eksportas al tiu nia suda najbaro tiom da bova viando - eksporto, esence minacata per la drastaj importlimigoj, kiujn la italoj vole-nevole planas.

Aliflanke, aŭstraj gastoj en Italio profitos per la krizo, ĉar la stabila boneco de la aŭstra ŝilingo pli ol kompensas la prezaltiĝojn, okazintaj en la italaj feriumejoj ekde la pasinta somero...."

ĜEuropa Esperanto-Revuo

Novspeca gazeto en Esperanto por legantoj en la tuta mondo

Kun raportoj kaj informoj el la eŭropa kaj monda Esperantomovado

Kun kulturaj felietonoj

Kun literaturaj kontribuoj

Jare 8 numeroj kun entute 96 paĝoj

Abonkoto por 1 jaro 16,- GM

por 1/2 jaro 8,- GM

Mendu tuj!

Viajn mendojn sendu al Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113

Postgironkonto Nürnberg 819 56-851

Stadtsparkasse Nürnberg 1.901.579